





Scienca Revuo Vol. 45 (1994)(2) - 165

*RECENZO*

**GEORGE GROSZ : Berlin - New York**

ARS NICOLAI, Berlin (D), 1994
Ekspozicio kaj katalogo
Eldonanto: Peter-Klaus SCHUSTER

Neue Nationalgalerie, Berlin
Kunstsammlung Nordrhein-Westfalen, Düsseldorf
Staatsgalerie, Stuttgart

Poeton diktatoroj timas -

tiu verdikto validas por George Grosz, ne poeto, sed en la 20-aj jaroj plej malŝatita pentristo de la ekfloraĵoj de la malbono, de egoismo, de profitavido, de la senskrupuleco de la burĝonaj eksponantoj, kiuj respondecis pri la unua mondmilito, sed nekletis ties sociajn konsekvencojn.
Grosz akrege atakis la reprezentantojn de la postmilita konservativa epoko, kiuj post la malvenko de ĝia mensoga ideologio komencis prepari denovan katastrofon kaŝinte sin malantau la konataj fatrasaj sloganoj por demokratio kaj religio el la tineo-kesto de la fermitkapa etburĝaro kaj memkontenta filistraro.
Alie ol John Heardfield li vivis lau malmorala persona stilo, emigris en 1933 al Usono, travivis la tutan malharmonion de nia jarcento eĉ kun emo al certa dandismo.
La ekspozicio estas unika kompleta elmontro de lia verkaro, el kiu estas reproduktita (1926) la tipaj

"Apogil-antoj de la socio".

rh